# Projekto: Baza Lernejo por Rumonge-Kanyenkoko en Burundo

Kadre de la ŝtata partnereco de Baden-Virtembergo kun Burundo, BAVELO eV en 2017 komencis partnerecon kun la Esperanto-asocio ANEB asbl en Burundo. Por daŭre vivigi la konstruadon ili decidis instali tri-jaran infanĝardenon - kiun ankaŭ la loĝantaro de tiu urba kvartalo tre deziris. Krome necesis aĉeti mankantan terenon ĝis la vojo - ties situo estis ŝovita je ĉ. 15 m - estis aĉetita. Ili petis nin akcepti ĉi tiun projekton.
Kaj dank' al donacoj de niaj membroj, de la ŝtata SEZ (Fondaĵo por Evoluo-Kunlaboro) kaj de "Cents-for-Help" (Laboristaro de firmao Bosch) la urĝe bezonataj renovigo-laboroj povis esti faritaj kaj krome poste 4 pliaj ĉambroj kaj apartaj necesejoj por knaboj kaj knabinoj konstruitaj.
En tiu-ĉi infanĝardeno - laŭ franca maniero nomata “Ecole Maternelle Espero” - la infanoj lernas la francan, ĉar tio estas (ĝis nun) la instru-lingvo en Burundo.
Ĉar ĉiu familio pagas la saman kotizon, malriĉaj familioj ankaŭ povas sendi siajn infanojn tien. Tiuj ricevas du-foje dum semajno bonkvalitan tagmanĝon (kun viando aŭ legomoj) - kion la gepatroj petis, ĉar multaj tion ne povas doni al siaj infanoj. Tio subtenas ilian korpan evoluon, kaj ke ili povas pli bone sekvi la lecionojn. Membroj de BAVELO donacas por tio $1200 jare.

Nuntempe estas 62 infanoj: 22 en la unua grupo, 28 en la dua kaj 12 en la tria grupo.
Kunlaborantaro: la estrino, 2 virinaj kaj 1 vira instruistoj, 1 domzorgisto kaj sekur-gardisto.
La lecionoj estas en la kirunda, la franca kaj ili ankaŭ ricevas lecionojn pri Esperanto. Krome estas kultura programo.

La malfermo de la nova lerneja jaro 2024-2025 komenciĝis la 16-an de Aŭgusto 2024. La nacia malferma ceremonio okazis ĉi-jare en Rumonge en ĉeesto de la Ministro pri Edukado. Al ĉi-tiu ceremonio estis invitita ankaŭ la estrino de nia infanĝardeno.

Post kiam la unuaj infanoj komencis iri en bazan lernejon je antaŭ-lasta jaro, evidentiĝis ke ili estas multe super la nivelo de la ŝtata bazlernejo kaj ke ili tie enuiĝas. Pro tio la gepatroj petis oferti ankaŭ bazlernejon, kiu estas adaptita al la nivelo de scio de ĉi tiuj infanoj. Ankaŭ la lernejaj aŭtoritatoj kaj la urbestro de la distrikto Rumonge-Kanyenkoko tre bonvenigis ĉi-tiun ideon. Ni esperas ke la unuaj infanoj de "nia" infanĝardeno povos iri en ĉi-tiun baz-lernejon jam en Septembro 2025.

Feliĉe, la najbara tereno estis ofertita por aĉeti ek de ĉi-tiu somero. Ĝi ofertas tre bonan ligon inter la infanĝardeno kaj la bazlernejo el organiza vidpunkto. Por ke la tereno (42 m x 16 m) ne estu vendata al aliulo aŭ la prezo altiĝus, ni (BAVELO) decidis forte subteni ĉi tiun aĉeton, sendepende de kiom rapide ĉi tiu lerneja projekto estos aprobita. De la prezo je US$ 12.000, ni jam pagis 8.000.
**Unue ni ankoraŭ nepre bezonas 4.000 $ ĝis 20a de Januaro 2025.**

Por subteni la konstruadon ni petis denove subtenon de SEZ - kun pozitiva perspektivo laŭ unuaj informoj. La konstruaĵo estos 40 m longa kaj 10 m larĝa, 2 etaĝa kun 6 klaso-ĉambroj por po 30 gelernantoj; la lerneja korto (iom pli ol 42 m x 6 m); la necesejoj estos aparte je la fino de la korto.
Financado: BAVELO ankoraŭ bezonas ĉirkaŭ 4.500 Euro por aĉeti la posedaĵon.
Se SEZ subtenas la konstruadon ni bezonos 2.800 Euro.

Pro financaj kialoj unue nur la teretaĝo estos konstruita, kaj poste en 2026 aŭ 2027 la dua etaĝo.
La konstruado de la teretaĝo kostas $20.000 (laŭ la kostolisto), la supra etaĝo kostas $16.000.

Financplano por la teretaĝo: SEZ 16.000, BAVELO 3000 kaj la loka kontribuo 1000 US$.
Certe havus sencon konstrui la tutan en unu agado; kio ŝparus 1000 $, sed tio dependas.

**Ni kore petas vin subteni la projekton kaj donaci** - tio povas redukti vian imposton -
al la konto de BAVELO eV, Sparkasse Villingen; bonvolu noti: "por Rumonge";
IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22, BIC: SOLADES1VSS



Agro-forsta ĝardeno: la arboj protektas kontrau suno kaj pluvego



Tagmanĝo en la infanĝardeno Rumonge, 2022



Infanoj en la korto, akvo-barelo por la manoj,
maldekstre la granda salono, dekstre oficejo de ANEB



Infanoj de la 3a grupo en nov-konstruita klaso



Nova tereno, dekstra muro de la infanĝardeno




Infanĝardeno  Ecole Maternelle 'La Espero'  > enirejo

La fotoj montras la legomĝardenon laŭ agro-forstado; infanojn manĝante kaj en la korto, krome 3a grupo de la infanĝardeno.
Sube la aĉetinda tereno por la estonta bazlernejo, rekte apud la infanĝardeno Ecole Maternelle 'La Espero' .   La brikoj ktp. estos uzataj por la konstruado. Prefere la arboj restu en la lerneja korto.

*Baze de raporto (2024-09-20) de Aime Patrick Manirakiza, Rumonge/Bujumbura, Prezidento de ANEB asbl <apmanirakiza@gmail.com>.  Pri demandoj bonvole skribu al la respondeculo por Rumonge de BAVELO eV : Dr. Manfred Westermayer, E-Mail: <Manfred@Westermayer.de>*

Tutkoran dankon por via subteno  – prefere antaŭ 20a de Januaro –  Manfred